

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

№ 3, Marto, 2008

Lucerna Esperanto-Societo

Kiel estas sciante, nia lasta kunveno estis dediĉita al la memoro de du mondfamaj E-stoj, forpasintaj en Januaro: C. Piron kaj D. Harlow. Ni atendis ankaŭ partoprenon de E-poeto el Pollando, kiu bedaŭrinde ne aperis en nia klubejo. Sed, kiel kutime, ni havas ne nur perdojn, sed ankaŭ gajnon - al nia Zamenhof-taga saluto reeĥis gesamideanoj de Ŝikaga partnero – Lucerno, urbo en la centra Svisio, fondita en 750. Pro tio, kara leganto, ni virtuale translokiĝas al la lando de bankoj, bongusta ĉokolado, manhorloĝoj, poŝtranĉiletoj. Jen kiun informon oni povas ĉerpi el la broŝuro “Geesperantistoj en centra Svislando” eldonita kaj sendita al ni de Lucerna E-Societo.

Kvankam LES estis oficiale fondita en 1927, de 1903 en la urbo loĝis membroj de la tutlanda E-organizaĵo, kiuj organizis E-kursojn, propagandis Ilon, agis diversmaniere. Pro sia ĝenerala neŭtraleco Svisujo estis bona grundo por la ĝermo de neŭtrala lingvo. En 1919 lucernanoj akceptis Ĝeneralan kunvenon de SES (Svisa E-Societo) kun la ĉefa tagordo “Propagando”.

En 1927 nekonata instruanto organizis E-kurson en Lucerno kaj samjare estis fondita Lucerna E-grupo (refondita en 1938). Teruraĵoj de la II Mondmilito silentigis E-istojn de multaj landoj, ankaŭ – en neŭtrala Svisio. Nur en 1946 okazis revekiĝo de E-movado. En la sama jaro esperantiĝis s-ino Sonja Brun, kiu nun estas sekretariino de LES (vidu la foton).

Sendube, la plej grava atingo kaj evento en la agado de lucernanoj estas UK, okazinta en 1979. Imagu, ke en la urbo kun 50 000 loĝantaro kolektiĝis pli ol 1600 personoj, parolantaj E-e: ŝajnas, ke surstrate ĉiuj parolas nur en la IL! Tiel okazis en Lucerno. Tiam forpasinta C. Piron estis rektoro de Internacia somera universitato, kies poemon legu sube:

*Kiam infano priĝemis sian suferon en Esperanto,
kaj apud vi ricevis esperantlingve konsolon,
kiam vi pene laboris kun grupo da amikoj
kaj kunsupertis en Esperanto la ĝojon kaj la zorgojn,
kiam, adoleske, vi flustris pri seksumo en Esperanto,
kaj poste esprimis en ĝi vian amon,*

*kiam rifuĝinto rakontis al vi en Esperanto
la turmentojn, kiuj igis lin forfuĝi,
kiam vi vidis spektantojn ĝislarne kortuŝitaj
ĉe aŭdo de poemo Esperanta
kaj ĉeestis tiulingvaj kverelojn,
kiam en diskuto pri politik' aŭ religio
vi diris en Esperanto viajn timojn kaj indignon,
kaj kiam, helpite en Esperanto,
vi tiulingve prikantis
viajn dankemon kaj raviĝon
pri la mirindeco de homa solidaro,
neniam, neniam plu vi taksos Esperanton
lingvo senanima, sensenta, sennuanca.
Mi scias.
Ĉion ĉi mi travivis.*

Nun en LES aktivas 20 membroj (vidu la foton de la estraro).



Novajoj

– Kiel konsekvenco de informa kampanjo de Svisa Esperanto-Societo, 27 svisaj parlamentanoj en la kantono Neuchâtel nun decidis subskribi mocion favore al Esperanto. La teksto de la propono restas sur tre ĝenerala nivelo por eviti ĝian rifuzon en la parlamento. Mireille Grosjean, kunprezidanto de SES, tamen ne havas tre grandajn esperojn pri ĝia akceptiĝo, sed opinias pozitiva jam la fakton, ke la propono estis subskribita kaj, lige kun sia diskonigo komence de marto, donos pozitivan publikecon al Esperanto.

– Ĵus aperis ĝisdatigo de kompilado pri E-kursoj oficiale organizataj en universitatoj kaj altinstitutoj. Aŭtoro de tiu kompilado estas sinjoro Germain PIRLOT. En tiu 22-paĝa dokumento (Word) troviĝas diversaj sciigoj pri 68 kursoj en 24 landoj. La liston kapas Ĉinio kun 18 kursoj kaj Japanio (7). En Usono oni registris 4.

UK'2008

Laŭ la lastaj informoj de CO, al impona festado de 100-jariĝo de UEA, kiu ĉi jare nomiĝas UK en Rotterdamo, jam aliĝis pli ol 1300 e-istoj el 61 landoj. Kiu prezentos nian Societon kaj estos raportisto por la bulteno SALUTON!?



Ili pace protestas ĉiujn tagojn ek de la 26a de aprilo 2007, eĉ en Esperanto !

Ĉiujn tagojn ek de la 8a matene, ili estas tie kun siaj aviztabuloj antaŭ la sidejo de la Monda Organizo pri Sano (MOS), kaj ili restos tie ankoraŭ monatojn kaj probable jarojn, ĝis ili estus aŭskultataj! Tiuj reprezentantoj de multaj internaciaj Ne-Registaraj Organizoj (NRO) petas :

- ke la MOS ĉesigu (aŭ ŝangi) la akordon, kiun ĝi kontraktis en 1959 kun la Internacia Atomenergio Agentejo (IAA), kies komisiono estas tutmonde disvolvi la uzon de la atomenergio. Tiu akordo malpermesas al la MOS publiki ajnan studaĵon se la IAA ne konsentas !
- ke la MOS reprenos en siajn manojn ĉiujn problemojn, kiuj rilatas la uzon de la atomenergio kaj nia sano,
- kaj ke finfine, ĝi akceptos publiki la veran bilancon de la eksplodo de Tĉernobyl la 26an de aprilo 1986, eĉ se tio malplaĉus al IAA, kiu ĝis nun estas juĝanto kaj juĝato.



Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ĝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;
Familia membro : \$30, Regula: \$20
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

KUNSIDO

okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

25an de Marto – d-ro L. Kordylewski rakontos pri Veliĉka sal-minejo

22an de Aprilo, 27an de Majo – prelegontoj estaj serĉataj

22an de Junio – tradicia pikniko

